

Post la manĝado ni du, do ŝi kaj mi, faris rajdadon al la jam menciita esplorada arbo sur la monta altaĵo. Gravis al mi fari laŭeble vastan ĉirkaŭvidon. La *squam*:oj de la suoj volis iri al la Nugget-tsil. Ili jam delonge devus esti alirintaj tien ĉi, sed tamen neniuj spuro de ili estis troveble tie ĉi. Ni eĉ ne estis rimarkintaj la premsignojn de unu sola homo. Tiam mi nun rajdis al la pinto pro ĉirkaŭvidi de tie.

Kiam ni alvenis tie supre, estis bela, pura, bone travidebla aero. Mi grimpis sur la arbon, tiel alten, kiel la branĉoj ebligis tion. La montaro de la Nugget-tsil estis sub mi. Ĝi estis kovrita per arbaroj. Transe de tiu arbarejo vastiĝis la jam antaŭe de mi priskribita, malabunde surkreskita prerio. Mi povis vidi ĝin, ankaŭ ĝisvaste malproksime, ĉie ĉirkaŭe. Sed videblis neniuj homoj, ankaŭ neniuj bestoj. Mi estis kunpreninta mian teleskopon. Per tiu mi traserĉis la tutan regionon. Neniuj spuro de ia vivantulo. Ni povis certi ne plu esti ĝenata hodiaŭ. Ni do rerajdis malsupren al la restejo kaj alvenis tie, kiam komencis malheliĝi.

Pappermann zorgis pro seka fajromaterialo, kiu sufiĉis pro la tuta nokto. Li kuŝis antaŭ la tendeniĝo kiel lojala hundo, kiu sentis sin esti devigite gardi ĝin. La „Juna Aglo“ sidis en lia proksimo. La du Enters:oj kaŭris ĉe la fajro kaj rostis iliajn leporaĵojn. Ili eldonis da tio pli poste ankaŭ al ni, kaj ni ne rifuzis kunmanĝi kamaradece. Ili ŝajnis al ni ŝanĝite. Ili kondukis iel pli neembarasite. Ili partoprenis en niaj interparoloj modeste, sed tamen en maniero, kvazaŭ nenio grava estus inter ni kaj ili. Kiu estis la kaŭzo pro tio? Ĉu ili nun havis pli bonan konsciencon ol pli antaŭe? Aŭ, pli ĝuste: ĉu iliaj intencoj nun estis pli malamikece ol antaŭe? Verŝajne! Eĉ ankaŭ rilate al Sebulon, kiu kondukis tiel kviete kaj prudente, kvazaŭ la hodiaŭa trezorfosada interokaziĝo estus komplete forigiinta el lia memoro. —

LA KLANO DE LA GARDANĜELOJ

Estis kaŭzita de la spertaĵoj de la hodiaŭa tago, ke ni ekskluzive parolis pri Winnetou kaj liaj apaĉoj. Mi rakontis kelkajn tre karakterajn epizodojn, kiujn mi travivis kun li; Pappermann raportis pri la maniero, en kiu li konatiĝis kun li, kaj la „Juna Aglo“ rakontis je diversaj ekzemploj pri la ega impresoj, kiun faris la mortinto eĉ post sia ekmorto al la indianoj, sed aparte al la apaĉoj kaj iliaj parencaj popoloj. La du Enters:oj nur aŭskultis. Ili ne parolis, ne unu vorton, sed oni povis vidi je ili, ke ili tute ne povis koncentriĝi. Tio ĝojis min. Verŝajne ili estis aŭdintaj de ilia patro kaj liaj kunuloj tiom multajn malamikecaĵojn pri mi kaj Winnetou, ke tute ne povis damaĝi nun, ke ili unu fojon nun eksciis ion pli bonan kaj pli ĝustan. La „Juna Aglo“ sentis per sia subtilemo, kiujn kaŝajn intencojn mi havis pri la fratparo dum tiu interparolado, kaj li helpis al mi pro tiuj intencoj, subtenante min je la klopodoj ŝanĝi ilian malamon en estimon.

Je tio la vespermanĝado estis nur mallonga interrompo. Kiam ĝi estis finigita Pappermann ekprenis unu el la cigaroj, kiel li provize kunprenis de Trinidad. La du Enters:oj elpoŝiĝis iliajn mallongajn pipojn kaj la tabakujojn. Ili demande transvidis al la Koretinoj

kaj ricevis la deziritan permeson doneme alkapjesigate. La „Juna Aglo“ ne fumis. Li asertis fumi nur dum interkonsiladoj, fakte nur el la kalumeto, alikaze ne. Kion koncernas min, oni ja scias, ke mi fumis tree, treege multe. Mi eĉ konfesas, ke mi estis la plej ega el ĉiuj fumantoj, al kiuj mi konatiĝis. Nun mi ne estas plu. Estis antaŭ kvin jaroj, kiam la Koretinjo petis min ne fumi tiel ege plu. Ŝi opiniis, ke mi rakontu al miaj legantoj tiom elstare multe, kaj tial klopodiĝu vivi laŭeble longe plu. Jen mi formetis la cigaron, kiun mi havis en la buŝon kaj diris: „Tiu estis estinta la lasta en la vivo; mi fumos neniam plu!“ Kial mi ne estus devinta obei al mia edzino? Ŝi ja pravis! Nun mi do estis je la sama punkto kiel la „Juna Aglo“: Fumi maksimume plu dum indianaj interkonsiladoj, fakte el la kalumeto, alikaze neniam! Tamen ne ideus al mi nei la stimulan efikiĝon de bona, kompreneme ĝuanta cigaro aŭ pipo, kaj same estas bonkonata al mi, ke nia ĉiutaga fantazio plej ŝate kaj certe ankaŭ plej komforte leviĝas per tabaknubetoj el la profundo al la alteco. La memorkapablo ŝajnas malfermite kaj la animo pli eme pro komunikado. Tion mi nun rimarkis ankaŭ je la „Juna Aglo“. Li ja ne fumis mem, sed lia mano ludis kun la fumaj ringetoj kaj ringoj, kiujn la flanke de li sidanta Pappermann delasis de siaj lipoj. Li ensuĉis la odoron de ties cigaro kun plaĉo, kaj ŝajnis ricevi per tio tute alian pensdirekton kaj esprimmanieron. Estas tutcerte pli strange, ke la libera indiano neniam estiĝas kutimfumanto kaj tamen, aŭ eble ĵus tial, estas atingebla al la pli bonaj kaj pli delikataj efikiĝoj de la nikotino. Li fumas nur je elstare gravaj kaj sanktaj momentoj.

La „Juna Aglo“ posedis riĉan internan vivon; sed li estis silentema. Hodiaŭ la unuan fojon, ekde mi konis lin, li iomete esprimemiĝis, sed tamen nur gardiĝe kaj nur iom post iom. Li ne parolis pri si mem, sed ekskluzive pri Winnetou, kaj mi havis la senton, ke estis la enfluo de la narkota odoro, kiu malfermis liajn lipojn. La Koretinjo utiligis tion pro demando, kies respondi okupis ŝin jam ekde nia mallonga resto ĉe la lago Kanubi. La „Juna Aglo“ estis ĵus parolinta pro nia renkonto kun la bela Aŝta, tiam mia edzino demandis:

„Mi vidis la stelon sur ŝia vesto, kaj mi vidas ĝin ankaŭ tie ĉi sur Vi. Kio estas tio pri tiu stelo? Kaj kio estas pri „Winnetou“ kaj „Winnetah“? Aŭ ĉu Vi ne estas permesita diri tion? Ĉu estas sekreto?“

Li fermis la okulojn mallongan tempon. Tiam li refermigis ilin kaj respondis:

„Ne estas sekreto. Ajn ĉiu rajtas aŭdi ĝin. Jes, ni eĉ deziras, ke la tuta mondo sciu ĝin kaj faru la samon kiel ni. Sed ĉu mi parolu pri tio ĵus tie ĉi kaj ĵus nun?“

Dum tiuj vortoj lia vido tuŝis la du Enters:ojn. Mi komprenis lin kaj respondis:

„Kial ne? Ne estas obstaklo.“

„Do ĝi estu!“

Li refermis la okulojn kaj pripensis. Tiam li komencis:

„Mi volus, ke mi rajtus paroli al Vi en la lingvo de la apaĉoj; ĉar tiu lingvo estas la vestaĵo, en kiu tio, pri kio mi parolas, iĝis en mian koron. La lingvo de la palvizaĝoj metas malbelajn faldaĵojn ĉirkaŭ la aĵo en mia interno.“

Li ankoraŭ estis teninta siajn okulojn fermite. Nun li fermis ilin kaj pluis:

„Estas en fora, fora distanco de tie ĉi en lando kun la nomo Ĝinistanujo. Estas konata nur al ni, la ruĝaj viroj, sed al la blankuloj ne.“

Oni povas facile imagi mian surpriziĝon, kiam mi aŭdis tiun nomon kaj tiujn vortojn el tiu buŝo. La Koretinjo fartis same. Ŝi rapide ekprenis mian manon, kvazaŭ ŝi bezonis apogilon, pro ne rapide elpuŝi la informon, ke li eraris pri nia nekono en alta grado.

„Ĉu Ĝinistanujo, ĉu?“ mi demandis. „Ĉu tiu vorto estas el la lingvo de la apaĉoj?“

„Ne, sed el unu tie ĉi komplete nekonata lingvo. Estis antaŭ multaj, multaj miloj da jaroj, kiam Ameriko ankoraŭ estis ligata kun Azio. Estis en la fora nordo ponto de tie transe ĉi tien. Tiu ponto nun estas disŝirita kaj ruinigita en unuopajn insulojn. Je tiu tempo, do antaŭ miloj da jaroj, venis altaj, bonegaj homoj, kiuj korpe kaj mense estis formigitaj kiel gigantoj, trans tiu ponto al niaj prauloj, kaj alportis salutojn de ilia estrino, la regino Marimê.“

Denove la Koretinjo kaŝe premis mian manon. Ŝi sentis same kiel mi, ke estis parolata pri nia Mara Durimê. La „Juna Aglo“ pluis:

„Iliaj mesaĝistoj transdonu delikatajn donacaĵojn. Estis malpermesitaj al ili akcepti redonacojn, ĉar dono, kiu estu respondata, ne estas donaco, sed ĉantaĝo. La senditoj de Marimê rakontis pri la alte situata regno Ĝinistanujo. En tiu estas nur unu sola leĝo, kiu havas la nomon „leĝo de la gardanĝeloj“. Tial Ĝinistanujo ankaŭ estas nomata la „lando de la gardanĝeloj“. Fakte tie ĉiu regnanto devas esti kaŝe la nekonata gardanĝelo de alia regnanto. Kiu decidas estiĝi la gardanĝelo de sia propra malamiko, tiu valoras kiel heroo, ĉar li venkis sin mem. Tio plaĉis al niaj prapatroj, ĉar ili estis same noblaj kiel la loĝantoj de la terparto Azio. Ili petis al la senditoj de Marimê helpi al ili establi tiun leĝon tie ĉi en Ameriko. Tiuj ŝate pretis. Ili faris, pri kiuj ili estis petitaj, kaj tiam ili remigris hejmen.“

„Ĉu ili revenis?“ demandis la Koretinjo.

„Ne la samaj, sed aliaj. Post ĉiu homaĝo venis senditaro pro alporti donacojn kaj vidi, ĉu la leĝo sur tiu ĉi parto de la mondo ankoraŭ valoris. Tiel pasis pluraj jarmiloj. La ĉielo estis sur la tero. La pordego al la paradizo estis vaste malfermite. Ne estis plu diferenco inter anĝelo kaj homo, ĉar ĉiu homo estis anĝelo, fakte la gardanĝelo de iu alia. Jen subite la vizitantoj forrestis, la nekstaj, ankaŭ la postnekstaj. Oni informiĝis, oni kontrolis. La ponto de Azio al Ameriko estis disfalita. Plu staris nur la kolonoj, tiuj de de savaĝa maro ĉirkaŭmuĝata insulo.“

„Se mi ne eraras, ili staras ankoraŭ hodiaŭ“, Pappermann interigiĝis. „Mi kredas, ke oni nomas ilin la Aleutoj.“

„Tio ĝustas“, la Koretinjo kapjesis. „Vi estas bona geografiisto, Mr. Pappermann!“

„Ho, tio signifas tute nenion“, li ridis. „Kiam mi vizitis la lernejon, transe en Germanujo, tiam ni konis la Aleutojn kaj la Beringan Maron pli bone ol niajn proprajn urbojn kaj stratetojn!“

„Pasis multaj, multaj homaĝoj, senke senditaro videbliĝis“, la „Juna Aglo“ pluis. „La interligo restis interrompita.“

„Ĉu oni ne povis provi realligi ĝin?“ demandis mia edzino.

La demandito ridetis malgaje.

„De nia flanko okazis nenio pro tio“, li respondis. „Ni ja estis ruĝuloj! Ni estis indianoj! Ni volis esti feliĉe kaj bonfarte, sed sen peno kaj klopodo. Tion ni supozis

ĉiam esti nia bona rajto. Pribatalita feliĉo estis tro multekosta al ni. Ni pensis, ke ni povis akiri ĝin pli malmultekoste. Ni ne antaŭsentis, ke la granda, ĉionscianta Manitou ekzamenis nin, ke la forresto de la senditaro estis aranĝita de li, pro agiti nin kaj instigi nin al propra agado. Sed niaj prauloj ne moviĝis, ili restis sidante. Ili ne sentis dankon pri la donaco de Ĝinistanujo. Ili ne faris kontraŭagon por Manitou, por la regino Marimê, pro la tenado de ilia paradizo, ilia bonstato, ilia feliĉo. Tiu estas la ega, la nepardonebla peko de niaj prauloj, kies konsekvencon ni devas elteni ĝis la hodiaŭa tago!“

Jen Sebulon mallaŭte ĝemis:

„La prauloj — la prauloj — la patroj!“

„Silentu, kaj ne ĝenu!“ lia frato petis.

La juna apaĉo pluis:

„Al la leĝo de Ĝinistanujo mankis la ĝistama de generacio al generacio kaŭzita renoviĝo de la hejmforto. Ĝi malfortiĝis; ĝia efikiĝo perdiĝis. La anĝeloj reestiĝis homoj. La ĉielo forlasis la teron. La paradizo malaperis. La amo ekmortis. La malamo, la envio, la egoismo, la memfiero rekomencis regi. La unu, granda regno kun la unu, sola leĝo komencis ŝanceliĝi. Tiu unu, granda raso, kiu apogiĝis kaj kreskis supren laŭ tiu unu, granda leĝo perdis tiun apogilon, tiun kolonon. Ĝi kolapsis, ja malrapide, malrapide, dum jarcentoj, sed certe. La regantoj estiĝis despotoj, la patriarkoj estiĝis tiranoj. Unue estinte nur unu leĝo de la amo, nun ankoraŭ regis plu nur leĝo de devigo. Kio benis antaŭe, tio nun malbenis; kio antaŭe kuniĝemis, tio nun postulis evitiĝi. La sole ebla ŝanco ŝajnis esti en la mano de la forto, de la senkompata rigideco. Kaj ili venis, la opresiantoj, la disciplinigantoj, la tiranoj. Ili regis per feraj pugnoj, sed nur dum kelkaj malmultaj jarcentoj. Ĉiu premo, ankaŭ la tirania premo, kaŭzas kontraŭpremon, kaŭzas varmecon, kaŭzas internan varmegecon, kiu emas liberiĝi eksteren. Tiu premo de nur de perforto kuntenitaj akvoj kreskis, ĝis la bordoj ne plu povis rezisti. La pezo de la pasintaj jarmiloj ekfikiĝis. Mi uzas geografian imagon pro la klarigo de tiu historia fakto: La pli alta lago premiĝis sur la lagon Michigan, tiun sur la lagon Huron, kaj tiu sur la lagon Erie. De tiu timiga pezo devis krevi eĉ rokaj bordoj. Kaj ili krevis! Formiĝis la Niagara. Unue la rivero, tiam la falo, en kiu la ruĝa raso vaporiĝis en atomojn, kaj ankoraŭ vaporiĝas plu, se ne el la profundo de tiu falo leviĝas granda, saviga penso, en kiu estas kaŝita la forto, kiu kolektiĝas la vaporeretojn, gutojn, ondojn kaj akvojn kaj reformiĝi en la estonta Ontario. Tiu imago certe estas fremde kaj nekutime al Vi —“

„Ĝi kutimas al ni“, la Koretinjo rapide interiĝis. „Ĝi formiĝis ankaŭ en ni mem, sen kunago de aliaj. Ni ofte, tre ofte paroladis pri ĝi, hejme kaj ankaŭ en tiu ĉi lando. La lastan fojon ĉe la Niagara mem, kun Atabaska kaj Algonka, la ĉefoj de la —“

„Kun Atabaska, ĉu?“ la „Juna Aglo“ rektiĝis per ĝoja surpriziĝo.

„Jes.“

„Kaj kun Algonka, ĉu?“

„Ankaŭ kun li. Ili estis kune.“

Tiu sciigo igis lin salte ekstari de sia sidloko. Lia ĝojo estis tiel ege, ke li tute ne ekpensis pri tio, ke indiano ne lasu sin regi nek de doloro nek de la ĝojo.

„Ili kunestis, kunestis!“ li elvokis. „Unu faris la penigan, longan vojaĝon al la alia! Tiam ambaŭ venis al la Niagara, la granda, emociiga imago de nia estinteco kaj estanteco. Kaj tiam — tiam — Ĉu Vi scias, kien ili volis iri de tie?“

„Al la Mount Winnetou.“

„Ĉu tio veras? Ĉu Vi scias tion certe kaj vere, *Mrs.* Burton?“

„Certe kaj vere!“ la Koretinjo asertis, kaj mi aprobis tion.

Jen li kunmetis la manojn, levis la vidon supren, kvazaŭ li volis preĝi, kaj diris en sono de profunde, profunde interna ĝojo:

„Al la Mount Winnetou! Savita — savita — savita!“

„Kio estas savita, kio?“ demandis mia scivolema edzino, la Klara, ne la Klanjo.

Li hezitis pri la respondo, sed jes eldiris ĝin, dum li malrapide residiĝis:

„La granda penso, kiu leviĝu el la profundo de la Niagara, estas savita.“

„Do ĝi jam tieas, ĉu? Jam estas trovita, ĉu?“

„Ĝi ne devis esti trovata. Ĝi jam tieis delonge, de jarmiloj. Ĝi estis kunŝirita en la pereon, en la falegon, en la kvirlon de la Niagara. Sed ĝi ne estis disbatita kaj ne dismuelita kiel ni, sed ĵus kiam ŝajnis kvazaŭ la akvoj forglutis ĝin por ĉiam, ĝi reaperis el ĝiaj kvirletoj, pure, klare kaj brilante kiel miraklo, pro esti kaptata kaj tenata de la posteuloj de tiuj, kiuj iam ne supozis la penon esti valora, ĝin, la donacon el Ĝinistanujo, transpreni en restantan gardon.“

Li estis parolinta en bela, kara entuziasmo. Oni vidis kaj aŭdis je li, ke li koncentriĝis pri la afero per ĉia pensado kaj sentado. Ankaŭ la scivolema Klara reestiĝis Klanjo, jes, eĉ la Koretinjo, elvokante same entuziasmigite kiel li:

„Mi scias, pri kio Vi parolas! Mi konas ĝin, tiun grandan, savigan penson!“

„Tio preskaŭ neblas“, li enĵetis.

„Ho ne, ho ne! Ni konis la penson verŝajne jam pli frue, multe pli frue ol Vi! Vi ja celas al la leĝo de Ĝinistanujo, al nenio alia: Ajn ĉiu homo estu la anĝelo de alia homo! Ĉu mi pravas?“

Ega, sed ĝoja miriĝo aperis en lia vizaĝo. Li elvokis:

„Vere, vere, Vi komprenis min! Kiel tio eblas, *Mrs.* Burton?“

„Ĉar ni konas tiun leĝon, kiel mi jam diris, same kiel Vi“, ŝi respondis. „Kaj ĉar — atentu, kion mi diras al Vi — ĉar ni konas Ĝinistanujon, kaj ankaŭ la reĝinon Marimê, kvankam Vi asertis, ke nur la ruĝuloj scias pri tio, sed la blankuloj ne.“

Li unue ne sciis, kion li devis diri post tio. Li demande vidis al mi.

„Ŝi pravas“, mi certigis. „Ni eĉ konas la veran nomon de la reĝino. Ŝi ne nomiĝas Marimê, sed Mara Durimê. Tiuj kvin silaboj estis kuntiritaj dum la pasiĝo de la tempo en tri.“

„Kiam Vi diras tion, Vi mem, tiukaze mi kredu tion“, li respondis. „Kiel mi ĝojas pri tio, kiel mi ĝojas! Vi konas la reĝinon; Vi konas Ĝinistanujon, kaj Vi ankaŭ konas la grandan, la mirakle simplan sed tamen ĉionampleksan leĝon de tiu lando. Tiel Vi estas ja eĉ multe, multe pli granda kaj multe, multe pli efika helpo ol Atabaska kaj Algonka, al kiuj Vi eĉ jam konatiĝis! Ĉu ili scias, kiu Vi estas?“

„Ne. Mi forsilentis tion de ili. Ni estis *Mr.* kaj *Mrs.* Burton, neniu plu.“

Lia alikaze tiel serioza vizaĝo vere ekbrilis per plezuro.

„Kiel ĝojigas min ankaŭ tio, ankaŭ tio!“ li diris. „Kia surprizigo, kiam oni ekkonos Vin! Kia ega, bela kaj feliĉiga impreso al Tatela-sata, mia amata mastro, kiam li ekscios, ke Old Shatterhand volas nenion alian kiel li! Vi estis dezirita, sed tamen timita, *Mr. Burton!*“

„Kial timita?“

„Ĉar Tatela-sata supozas Vin esti pli supraĵe ol Vi estas! Ĉar li timas, ke Vi konsentos pri la planata monumento, tiu pompaĵo de supraĵaj kaj talpokulaj pensistoj. Via voĉo valoras grave; tion li scias, kaj tion scias ni ĉiuj. Se Vi donus ĝin pro la partio de la fanfaronistoj, atendos nin anstataŭ la sopirita renaskiĝo la kompleta neĝo. La animo de nia nacio, de nia raso vekigis. Ĝi streĉiĝas; ĝi moviĝas. Ĝi komencas pensi. Ĝi volas senti siajn membrojn kiel unuigintaĵon, kiel interapartenantaĵon, kiel grandan tutajaĵon. Ĉiuj komprenemuloj peniĝas al tiu benigna, forton promesanta unueca sento. Sed nun vidu al la suoj, la jutoj, la kajovajoj, la komanĉoj! Ili ekprenas la armilojn, ne kontraŭ la blankuloj, sed kontraŭ si mem, kontraŭ la propra animo. Ili staras prete pro teren piedbati tiun animon, kiu estas momente nur ekvekiĝinta, pro neigi ĝin por ĉiam. Kial?“

Li certe volis respondi al tiu demando mem, sed la Koretinjo estis iom pli rapide ol li:

„Ĉar Old Surehand, Apanatŝka, iliaj filoj kaj ilia anaro lezas la bonrajtigitan nacian senton de tiuj triboj, ekagigante fari al la ĉefo de la apaĉoj senekzemple troigitan honoron, kiun li ne meritas.“

Li ĵetis mirigitan, jes, preskaŭ ektimigitan vidon unue al ŝi, kaj tiam al mi. Estis, kvazaŭ li kredis, ke li ne povis fidi pri siaj propraj oreloj.

„Kion diris *Mr. Burton?*“ li demandis. „Ŝi nomas tiun honoron senekzemple troigita, ĉu?“

„Jes, tion mi faras!“ la Koretinjo respondis.

„Kaj ke li ne meritas tiun honoron, ĉu?“

„Ankaŭ tion mi asertas!“

„Kaj Vi amas nian Winnetou, ĉu, *Mr. Burton?* Kaj Vi estimas lin, ĉu?“

Li estis estiĝinta tre serioze. En tiu momento li havis la aspekton, kvazaŭ lia vizaĝo estis skulptita el marmoro. La saman seriozecon montris ankaŭ mia edzino. Ŝi respondis:

„Mi amas lin, kaj mi estimas lin, kiel escepte de mian edzon neniun alian homon!“

„Kaj tamen Vi parolas pri troigiteco kaj de nemerito, ĉu?“

Li malrapide restariĝis de sia sidloko. La Koretinjo faris la samon. La sento, ke la nuna momento estis gravega, igis ambaŭ ne resti sidante. Ankaŭ mi leviĝis de la tero. Mi eĉ ne nur havis la saman senton, sed eĉ estis al mi, kvazaŭ en tiu ĉi momento estis farata antaŭdecido, de kiu dependis multo kaj eminentaĵo. Mi estis trioĉe pli aĝe ol tiu juna viro, sed tamen mi ne ekhavis la ideon supozati min nun esti ankaŭ trioble pli saĝe. Por mi personiĝis en li ne nur la ĵus komencinta movado, kiu estis nomita per la vorto „junindianoj“, sed la sorto de la tuta indiana raso. Li estis estinta ĉe la blankuloj kvar jarojn, kaj estis atinginta tie, kiel ŝajnis, nekutimajn sukcesojn. Li konis Atabaska:n kaj Algonka:n. Li korespondadis kun Vakon, la famulon. Li estis la lerninto kaj, kiel mi supozis, la favorato de Tatela-sata, do la postanto de mia Winnetou en la koro kaj en

la animo de la plej eminenta medicinistoj de ĉiuj ruĝaj nacioj. Tial mi ja devis esti modeste. Tial mi devis eviti superiĝi. Li staris malgraŭ sia juneco mense komplete samrange antaŭ mi. Mi do eligis mian edzinon el la interparolado kaj respondis anstataŭ ŝi:

„Ĵus ĉar ni amas lin en tiu maniero kaj estimas lin en tiu maniero, kaj ne povas toleri, ke oni priridigis lin laŭ mia opinio por la posteularo. Oni konstruu lian monumenton laŭvole alte, verece li rangas pli alte plu! Kiu starigas videblan monumenton por li, tiu do ne plialtigas lin, sed devigas lin plimalaltiĝi. Li malhonoras lin anstataŭ honori lin. Winnetou estis nek scienculo nek artisto, nek bataladovenkinto nek reĝo. Li havis tute neniun publikan postenon. Do pro kio monumento? Kaj pro kio tia senekzemple stranga kaj multekosta? Tia senekzemple deklamega? Per kio nia nekomporeble nobla amiko meritis tian ofendon, tian humiligon? Vere ne estas plimalaltigo, kiam mi asertas pri li, ke li estis nek scienculo aŭ artisto, nek bataladovenkinto aŭ reĝo, ĉar li estis pli ol ĉi ĉio: Li estis homo! Li estis noblulo! Kaj li estis la unua indiano, en kiu la animo de sia raso vekigis de la morta dormado. En li ĝi estis renaskita. Tial li estis nur animo, kaj volis esti nur animo! Kaj tial li estu nur animo, kaj restu animo! Do ĉiaj monumentoj forrestu! Li loĝis en niaj koroj kaj tenu tiun loĝejon! Ajn kiu pensas, ke li povus ŝiri lin el la koroj kaj entombigi lin en metalon aŭ ŝtonon, tiu sentu nian kontraŭon! Ĉu komprenite? Li vivu kaj restu vivanta, en mi, en ni, en Vi, en lia popolo, en — la animo de lia popolo, kiu ekhavis per li novan konscion, fakte la konscion, ke por al pereco dediĉata nacio la granda leĝo de Ĝinistanujo estas la sola rimedo saviĝi de tiu pereco. Li tutcerte povus fifariĝinta heroon, batalestron. Li rezignis pri tio, ĉar li eksciis, ke tiu nur estus plirapidiginta la finon. Li konsilis pro paco, kaj ajn kien li venis, tie li alportis kaj donis nur pacon. Li estis la anĝelo de siaj anaro! Li estis la anĝelo de ĉiu homo, kiun li renkontis, ĉu amiko, ĉu malamiko, tute egale! Kiam la animo de lia popolo vekigis en li, ĝi vekigis nepre kiel la konscio pri tiu anĝela leĝo, en kies lastaj tagoj ĝi iam estis ekdormiĝinta kaj malaperiĝinta. Winnetou do estis la anime rekta posteulo de la lasta, eminenta, malnovindiana reganto, al kiu venis la senditoj de la reĝino Marimê, pro poste ne reaperi. Ĉu vi komprenis tion, vi, liaj ruĝaj fratoj? Ĉu vi komprenis ke estas permesata al neniuj popolo resti infano? Ĉu ke vi iam estis infano kaj tial estis igita en pereon nur tial, ĉar vi ne volis ĉesi resti infano? Ĉu vi komprenis, ke vi ekdormiĝis kiel infanoj, pro vekigi nun post profundaj Niagaraĵoj revoj kiel viroj? Ĉu vi komprenis, ke vi nun, se vi ne estiĝas viroj, pereos por ĉiam? Ĉu vi komprenis kion signifas estiĝi viro? Personeco, ĉu, kiu kapablas per propra energio faradi kaj agadi, sen permesi kompromisaĉon? Personeco, ĉu, kiu konas ĝiajn celojn kaj strebas al ili, sen deigi al ajn iu flanko? Ĉu vi komprenis, kiel estu pentofarata, kiam centoj da malgrandaj kaj ĉiam pli malgrandaj indianaj nacioj kaj indianaj nacionetoj dum miljaroj interbatalas kaj interneigiĝas? Ĉu ke estis milionobla memmortigo, per kiu vi pereis? Ĉu ke la sango- kaj landoavido de la palvizaĝoj estis nur discipliniga vipo en la mano de la granda, saĝa Manitou, kies batoj devis veki vin el la dormado? Ĉu ke vi povas pentofari nur per amo, pri kio vi kulpiĝis per malamo? Ĉu ke la ĉielo de viaj prauloj perdiĝis, ajn kiam ĉiu ruĝa viro estiĝis la diablo de lia frato? Kaj ĉu ke tiu ĉielo nur tiam remalleviĝos en la mondon, kiam ĉiu ruĝa viro klopodiĝas esti la anĝelo de siaj fratoj, kiel estis je tiu tempo, je kiu Marimê, la reĝino, ne plu estis devigita rezigni pri vi?“

Tiu estis longa, longa parolado, kiun mi estis farinta. Sed estis skribita en la letero de Winnetou, ke lia koro ekde hodiaŭ estus batanta kune kun la mia, kaj tiel pensoj kaj vortoj iĝis tra miaj lipoj, kiujn mi alikaze eble estus reteninta. La ‚Juna Aglo‘ staris antaŭ mi, kvazaŭ lia vido volis trinki ĉiun vorton de mia buŝo. Mi vidis, ke li miriĝis, kaj ke tiu miriĝo kreskis. Apenaŭ ke mi estis dirinta la lastan vorton, eksonis lia mirigita demando:

„Diru, *Mr. Burton*, ĉu Vi vere ne jam estis ĉe Tatela-sata?“

„Neniam“, mi respondis.

„Kiujn el liaj multaj verkoj Vi legis?“

„Neniun. Mi ne ne iam vidis libron de li, des malpli mi legis iun.“

„Strange, ege strange! Vi ankaŭ ne povas havi tion de Winnetou!“

„Kion?“

„La pensojn, kiun Vi ĵus vestis en vortojn.“

„Ajn ĉiu homo havas sian propran pensmondon. Mi ne ŝtelas de aliaj mondoj. Ankaŭ la demandoj, kiujn mi faris al Vi, estis miaj propraj. Estas Via libera decido, ĉu Vi volas respondi al ili aŭ ne.“

„Mi respondas ŝate. Ne nur per la vorto, sed ankaŭ per la ago. Vi demandis min, ĉu ni komprenis. Eble ne ĉion, sed tucerte ja la plejparton. La pruvo estas tie ĉi.“

Li montris al la dekduradia stelo sur lia brusto kaj pluis:

„*Mrs. Burton* deziras scii, kion tio signifas, kaj mi respondas: Ke ni petas pentofari pri la estinteco. Ke ni ne plu malamas, sed volas ami. Ke ni ĉesis esti la diablo de niaj fratoj, kaj ke ni klopodas remeriti la perditan paradizon. Konkize, la leĝo de Ĝinistan-ujo revaloru ĉe ni. Ni volas esti elkore interligataj, ne plu strebi unu for de la alia. Ni volas ĉirkaŭbrakumi unu la alian, tiel dense, ke neniu forto povos paŝi interen, efikiĝi intere. Ni ne havas reganton, kiu povus ordoni tion al ni; ni ordonas tion al ni mem. Tiu penso deiris de Tatela-sata, la mastro. Mi estis la unua, kiun li nomumis ‚Winnetou‘. Baldaŭ estiĝis dek, tiam dudek, kvindek, cent; nun ili jam estas miloj.“

„Kial vi donis al vi ĵus la nomon de Winnetou?“ la Koretinjo demandis.

„Ĉu povis esti iu pli bona? Ĉu Winnetou ne estis ekzemplo en la plenumado de niaj ordonoj kaj agodevoj? Ĉu li ne plenumigis ĉiujn tiujn sen esti devigita al tio? Kaj antaŭ ĉio la ĉefaĵo: Ĉu la nomoj Winnetou kaj Old Shatterhand ne estiĝis proverbe inter la ruĝa nacio? Ĉu ne simbolo de la amika kaj la homa amo, de la helpopreteco kaj la sindonemo eĉ ĝis la morto? Ĉu iam, dum la tuta historio, estis du pli sinceraj kaj pli fidelaj amikoj ol tiuj du? Kie la vorto, ke unu estis la gardaĝelo de la alia, estas pli ĝuste ol pri ili? Kion ni faris, ne estas io speciala. Ni establis klanon, novan klanon, kiel tiaj estis tiom multaj kaj estas ankoraŭ hodiaŭ inter la ruĝaj viroj. Ĉiu membro deviĝas esti la gardaĝelo de alia, dum la tuta vivo, ĝis la ekmorto. Ni do povus esti nomintaj tiun klanon la ‚Klano de la Gardaĝeloj‘, sed nomis lin la ‚Klano Winnetou‘, ĉar tiu sonis pli modeste kaj pli koncize. Per tio ni trafumas la ĝuston kaj honoras per tio la memoradon pri la plej bona kaj plej amata ĉefo de ĉiuj tempoj kaj ĉiuj apaĉaj triboj. Sed ni volas resti je la vereco. Ni ne volas troigi. Ĝi estu la sola memorilo, kiu la ruĝa raso establas por li. Ne estas pli bona kaj pli vera. Monumento el oro aŭ marmoro, en

giganta grandeco, sur pompa monta alteco, vaste vidanta trans lando kaj popolo, estus mensogo, estus superiĝo. Superiĝo kaj mensogo de ni, sed ne de Winnetou. Li neniam mensogis, kaj li modestis. Je tiu sincereco kaj modesteco ni egalas al li. Li estiĝu nia animo, estu nia animo. Tiam li staros pli alte ol ĉiu punkto de la roka montaro! Kaj tiam li estas pli granda ol la kolosa statuo, kiujn malgrandaj homoj nun volas starigi por li! Feliĉigas min esti aŭdinta, ke Old Shatterhand havas la saman opinion. Mi volas, ke Tatela-sata ekscias tion laŭeble baldaŭ. Ĉu Vi permesas al mi, ke mi lasas tion diri al li per mesaĝisto?“

„Tre ŝate. Sed kiu estu tiu mesaĝisto?“ mi demandis.

„Neniu el ni. Mi vokos lin.“

Li deturniĝis de la fajro, al sudo, metis la manon al la buŝo kaj sonigis la tri silabojn „Win — ne — tou!“ ne trolaŭte, sed tamen vaste transigante.

„Win — ne — tou!“ resonis.

„Ĉu tiu estas eĥo?“ la Koretinjo demandis.

„Ne“, diris la „Juna Aglo“. „Estas unu Winnetou.“

Estis nokto. La steloj lumis. En ilia brilo ni vidis post mallonga tempo figuron proksimiĝi al nia tendo, malrapide, per certa paŝado kaj sen hasto. Ĝi surhavis la saman veston kiel tiutempe Winnetou. Ĝiaj haroj estis supre kunligitaj al kresto, kaj pendis ĝis vaste malsupre laŭ la dorso. Armilojn ĝi ne kunhavis. Ĝi ekstaris silente antaŭ ni. Nun la brilo de la fajro trafis ĝian vizaĝon. Ni vidis, ke estis viro, en la aĝo de eble kvardek jaroj.

„Ĉu vi estas la gardisto de la Nugget-tsil?“ la „Juna Aglo“ demandis.

„Estas mi“, la alia respondis.

„Tuj sendu mesaĝiston al Tatela-sata. Dirigu al li, ke la „Juna Aglo“ revenis kaj solvis sian taskon. Lasu krome diri al li, ke ankaŭ venis Old Shatterhand kaj ke li trovis la postlasaĵon de Winnetou. Kaj fine lasu diri al li, ke li povas fidi pri Old Shatterhand en la monumenta batalo kiel pri si mem!“

Tio estis memkompreneble dirata en la lingvo de la apaĉoj. Post tio la „Juna Aglo“ faris manmovon de salutado, kaj la viro foriĝis sen paroli unu vorton plu.

„Kiel strange!“ la Koretinjo diris al mi.

„Ne strange, sed male tre facile klarigeble“, li respondis. „Ĉe Tatela-sata, do ĉe la Mount Winnetou, Vi ekkonos la organizon de nia klano detale, kaj trovos nenium spuron da strangecon en ĝi.“

„Ĉu ni ne rajtas jam nun ekkoni detalaĵojn?“ ŝi demandis.

„Mi estas revenanto, do ne prifidinda sciiganto. Mi ja havis ankaŭ kontakton kun la klano en la foreco, sed nur rilate al tregravaĵoj kaj ĝeneralajoj. Pro informadi mi nun mem estas sufiĉe sciigita.“

La du Enters:oj ĝis nun estis konduktintaj tute silente. Do ni rimarkis, ke Hariman aŭdebliĝis ĵus en tiu ĉi momento, dirante:

„Sed tiu afero ja estas senfine interesiga al mi! Ĉu mi ne almenaŭ rajtas ekscii, ĉu ankaŭ blankuloj povas estiĝi membroj de tiu „Klano Winnetou?““

La demandito respondis:

„Origine ĝi estis fondita nur por indianoj, sed estus kontraŭ ĝia baza penso ekskludi la blankulojn. Ni deziras, ke la amo al la proksimulo, al kiu ni strebas, unuiĝu ne nur nin, sed la tutan homaron.“

„Ĉu oni povus malpermesi al ni fondi apartan ‚Klanon Winnetou?‘“

„Neniu homo havas la rajton pro tiu malpermeso.“

„Ĉu ĉiu membro povas elekti la alian membron, kiun li volas gardi?“

„Ne. Li anoncu siajn dezirojn, kaj pri tiu oni decidos, se eblas. Sed se estus libera elekto al ĉiu de sia gardato, estus tre baldaŭ tre multaj personoj, kiuj havas multnombrajn gardantojn, kaj same multajn, kiuj havas neniun gardanĝelon. Gardi iun, kiun oni amas, ne estas merito. Sed esti la anĝelo de malŝatato aŭ eĉ de malestimato, tio estas pena, kruta vojo supren al la nobla, vera homeco.“

„Kaj ĉu oni konas publike la gardanton kaj lian gardaton?“

„Ne. Estas sekreto. Eĉ ne la gardato konas sian gardanton.“

„Ankaŭ ne pli poste, ĉu?“

„Sed jes! Fakte post ties ekmorto. Ambaŭ estas notataj. Kaj ĉiu gardantoj havas la nomon de sia gardato sur la interna flanko de la stelo sur lia brusto. Kiam oni deigas post lia ekmorto la stelon de lia vesto, tiam oni ekkonas, kies anĝelo li estis estinta.“

„*Well!* Tion oni ekkonu ankaŭ je mi!“

„Je vi, ĉu?“ lia frato demandis mirigite.

„Jes, je mi!“ Hariman respondis per tre decidita sono.

Sebulon ekridis kaj demandis:

„Ĉu vi do ankaŭ estas unu Winnetou, fakte maskaĉita?“

„Ne, sed mi volas esti!“

„Ne lasu ridi pri vi! Ĉu vi pensas, ke oni akceptus vin, ĵus vin, kiel la unuan blankulon?“

„Ne. Tion mi ne imagas. Sed tamen mi estos unu Winnetou. La afero plaĉas al mi eksternorme. Mi volas esti ĝin la mia. Kaj ĉar neblas al mi esti ĝi ruĝa Winnetou, tial mi estiĝos blanka!“

„En kia maniero?“

„En la plej simpla maniero: Mi fondas klanon por blankaj Winnetou:oj.“

„Kiam?“

„Hodiaŭ, ĉi tie, nun, tuj!“

„Freneza ulo!“

Dum tiu elvoko li faris malestimon, forĵetan manmovon. Hariman sed ne lasis sin iriti. Li diris:

„Ridu, kiel vi volas! Kaj moku pri tio! Mi tamen faras tion! Mi devas, mi devas! Kaj vi ankaŭ iam devos voli!“

„Ĉu mi? Ĉu devos? Ne ekideos al mi!“

„Ĉu ekideos al vi aŭ ne, estas flankafero. Ankaŭ al mi ne ekideis. Ĝi venas, ankaŭ sen ke oni volas ĝin. Kaj kiam estas alveninta, oni obeu. Do, mi nun fondas ‚Klanon Winnetou‘ por blankuloj. Ĉu mi estas kaj restos la unua kaj sola membro de tiu klano, tio ne gravas en tiu ĉi momento. Kaj ĉu mi priiridigiĝas min per tio, estas egale al mi.“

Sed mi deziras, ke almenaŭ iu pli membriĝas, kaj tiu iu estas vi, Sebulon!“

„Tion enkalkulu ne, tute ne!“ tiu respondis.

„Mi tamen enkalkulas tion, tamen, kaj vi vidus, ke vi devas — ke vi devas! *Mr.* Burton, vi estas sinjorino, kaj tial mi supozas, ke vi kunhavas kudrilaron, ĉu?“

„Fakte jes“, la Koretinjo respondis.

„Mi petas pri kudrilo kaj pri fadeno da bona, nigra tvirno! Ankaŭ pri tondilo!“

„Tion Vi havu“, ŝi diris, kaj iris al la tendo pro alporti la deziritajojn.

„Kaj Vi, *Mr.* Burton, estas aŭtoro“, li turniĝis al mi. „Vi do verŝajne kunhavas inkon kaj plumon, eĉ tie ĉi, tiel fore en la okcidento, ĉu?“

„Vojaĝa skribilaro tieas“, mi deklaris.

„Do, bonvolu, donu al mi plumon kaj kelkajn gutojn da inko! Paperon mi havas mem.“

„Mia edzino kunalportos ambaŭ.“

„Kion vi volas per inko kaj plumo?“ Sebulon demandis.

„Skribi la nomon de la persono, kiun mi volas gardi.“

„Frenez, vere frenez! Ĉu mi almenaŭ rajtas scii, kiu estas tiu persono?“

„Ne! Neniu homo rajtas scii tion! Vi plej minimume!“

Post ke la Koretinjo estis alportinta la deziritajn aĵojn, Hariman tranĉis el la felo de la hodiaŭ manĝita leporo malgrandan, dekduradian stelon, de kiu li gratis la harojn per lia akra tranĉilo. Tiam li ĝustigetranĉis etan papereton por si mem kaj skribis sur ĝin, ĝin metante sur lian genuon, en malrapida movado la rilatan nomon. Post tio li difinis la rilatan lokon sur la brusto de sia vesto, demetis ĝin kaj ekiĝis alkudrigi la stelon tien. Sebulon rigardis ĉiujn el liajn movojn per pli ol scivolaj vidoj. En liaj mienoj ŝanĝis la esprimo de mokado per profunda, timeca streĉiĝo. Hariman ne posedis lertecon pri kudradon. Jam post la unuaj pikoj li relozigis. Tio ripetiĝis. Li malpacientiĝis.

„Estas, kvazaŭ ĝi ne estu; sed mi tamen faras ĝin!“ li koleriĝis.

Jen demandis mia edzino:

„Ĉu Vi ne volas permesi al mi alkudrigi la stelon? Mi kapablas tion ja pli facile kaj pli rapide.“

„Ĉu Vi vere bonvolas, *Mr.* Burton? Kiel afable Vi estas, kiel afable! Jes, jen Vi havas la vestaĵon, la stelon, la falditan paperon, kiu estu sub la stelo, la tondilon, la kudrilon kaj ĉion! Sed, mi petas, ja ne disfaldu la paperon pro legi ĝin!“

Ŝi metis la paperon al la difinita loko de la vesto, la stelon sur tion kaj komencis, en tre zorga maniero, la laboron. Dek du radioj postulis multaj, multaj pikoj.

„Tiom multe da klopodo mi ja certe ne estus farinta al mi!“ Hariman konfesis. Kaj post momento li aligis, kiel parolante al si mem: „Ja estas stranga, tute, tute stranga afero! Kiam mi skribis la nomon, estis al mi, kvazaŭ mi subskribus mian propran mortojuĝon. Sed tamen mi fartis tiel facile kaj bone!“

Ankaŭ Sebulon atentis. Li preskaŭ ne deigis unu vidon de mia edzino. Sed lia atento pli koncentriĝis al ŝia vizaĝo, ol al ŝia laboranta mano. Intertempe li malfermis la okulojn, kvazaŭ io je tio dolorigis lin. Kaj — kio nu estis tio? — mi vidis guton flui laŭ lia frunto, tiam kroman kaj denove kroman! Ĉu li ŝvitis? Liaj manoj ekiĝis al la leporofelo.

Li ŝajnis ne voli, sed tamen ekprenis ĝin. Tiam li prenis la tondilon kaj eltranĉis, tute kiel sia frato antaŭe, dekduradian stelon. Tio okazis tiel hezite, tiel kontraŭvole, preskaŭ kiel en sonĝo. Tiam li degratis la harojn, ŝovis la stelon al la Koretinjo kaj petis:

„Bonvolu, *Mrs.* Burton, poste ankaŭ por mi!“

„Ĉu alkudri?“ ŝi demandis.

„Alkudri“, li kapjesis.

„Kun papero, ĉu?“

„Jes, kun papero kaj nomo. Tiun mi nun skribos.“

„Do sed jes! Ĉu mi ne diris ĝin?“ Hariman elvokis.

„Silentu!“ lia frato kolere diris al li. „Mi ne faras ĝin, ĉar vi volis, sed ĉar mi volas! Mi ankaŭ povas gardi! Ĉu komprenite?“

„Sed kiun?“ Hariman demandis.

„Tio estas mia sekreto! Ĉu vi nu diris la nomon de tiu, kiun vi skribis? Do vi ankaŭ ne ekkonos tiun, kiun mi skribos!“

Li ekprenis plumon kaj paperon kaj skribis. Estis nur mallonga nomo, do laboro pri nur malmultaj silaboj; sed li tamen bezonis pli longan tempon pro tio. Li interĉesis plurajn fojojn. Li enspiris profunde, profunde. Finfine li finiĝis, lasis la skribon mal-sekiĝi, tiam kunfaldis la paperon plurajn fojojn kaj ŝovis ĝin al la Koretinjo.

Kion la fratoj faris tie, tio fakte tute kaj komplete ne estis malkutimaĵo. Certe kelkaj aliaj, anstataŭ mi, estus priskribinta tion kiel infanaĵo, kiel ludaĉo. Sed tamen estus estinta al mi komplete neeble rideti pri tio. Mi havis la senton, kvazaŭ dum tio efikiĝis interna deviĝo, al kiu povis rezisti nek tiu, nek la alia.

Kiam la Koretinjo estis finiginta sian laboron, la du fratoj resurmetis iliajn vestaĵojn. Ili rigardis unu al la alia, preskaŭ malamikece, tiam pli amikece kaj ĉiam pli amikece. Fine Hariman ridis; sed Sebulon nur ridetis.

„Ĉu vi scias nun, kio vi estas?“ Hariman demandis.

„Unu Winnetou.“

„Jes. Sed ĉu vi ankaŭ scias, kion signifas tio?“

„Ke mi estas la anĝelo de alia, kiun mi gardu.“

„Ho, ne nur tio! Al tio mi tute ne celis, ĉar tio komprenendas per si mem. Sed vi nun surhavas la nomon de tiu, kiun ni malamamis, kiel oni ĝenerale malamamas neniun homon, sed nur demonojn kaj diablojn!“

„Vi ja ankaŭ!“

„Certe jes! Sed ĉu vi pripensis, ke tiu malamo nun estas je la fino? Estu je la fino — estu, ĉu?“

„Nenion, tute nenion mi pripensis!“ Sebulon ekkoleriĝis. „Mi faras tion, kion mi volas! La pripensado kaŭzas nur fremdan volon. Mi estiĝis unu Winnetou, kaj —“

„Ne, Vi ne estiĝis alia“, la Juna Aglo^o interrigis.

Estis la unua fojo, ke li parolis libervole al Sebulon.

„Ĉu ne?“ tiu demandis. „Ĉu io ankoraŭ mankas pro tio?“

„Jes.“

„Kio?“

„La ĵuro.“

„La ĵuro, ĉu? Oni ĵuru? Ĉu ĵuri ĵuron? Kiun?“

„Ke oni volas fideli al sia gardanĝela devo ĝis en la morton. La ruĝaj viroj ne bezonas ĵuron. Inter ili sufiĉas la manpremo, ĉar ĝi estas al ili same sankte kiel la ĵuro.“

„Ankaŭ al ni!“ Hariman vokis.

„Jes, ankaŭ al ni!“ Sebulon vokis.

„Do stariĝu!“ li ordonis al ili.

Ili faris tion. Ankaŭ li leviĝis de sia sidloko. En tiu momento Pappermann ĵetis grandan, rezinhavan lignopecon en la fajron. La flamo ekgrandiĝis. Ĝi iĝis al ĉiuj direktoj. Jen la arbaro ŝajnis esti ekloĝata de fantompalaj kreaĵoj. La noktaj ombroj de la arboj kaj arbedoj moviĝis. Ili rapide ŝanceliĝis jen kaj reen. Ili saltis alten kaj malleviĝis sur la teron.

„Unu etendu la manojn al la alia!“ la juna indiano ordonis.

Ili obeis. Jen li paŝis tute proksime al ili, metis sian manojn sur iliajn, kaj postulis de ili:

„Rediru miajn vortojn: ‚Al niaj gardatoj fidele ĝis en la morton!‘“

„Al niaj gardatoj fidele ĝis en la morton!“ sonis unuigite el iliaj buŝoj.

„Tiuj vortoj estas nia ĵuro! Rediru tion!“

„Tiuj vortoj estas nia ĵuro!“ ili aligis.

„Nu! Nur nun Vi povas aserti, ke Vi estiĝis Winnetou:oj. Ĉar ne la stelo faras tion, sed la volo. Kaj tiun volon Vi anoncis. Mi estas atestanto. Donu Viajn manojn ankaŭ al mi, Via atestanto!“

„Jen la mia“, Hariman diris, dum li ekprenis lian.

„Kaj jen la mia“, Sebulon parolis.

La juna apaĉo ekprenis ambaŭ kaj diris:

„Ĉu Vi konscias pri la graveco de tiu ĉi momento?“

Neniu respondis. Tiam li pluis:

„Kion Vi ne scias, tion scias Manitou, kaj kion Vi ne kapablas, tion li kapablas. Aĵn kiu gardas aliajn, gardas sin mem. Ekintencinte, ke Vi estas la anĝeloj de Viaj gardatoj, verece ili estiĝis Viaj. Restu fidelaj al ili kaj Vi! Tiu estas la sola danko, kiujn ili postulas de Vi!“ —

„MALHELA HARO“

Mi estis decidita la sekvintan tagon pro gajni superrigardon pri la elterigitaj skribaĵoj, sed bedaŭrinde estis erarinta pri la espero povi fari tion. Ni ankoraŭ sidis pro trinki la matenan kafon, kiam je la suda rando de la maldensaĵo ekaperis la figuro de indiano de malantaŭ la arboj, kiu venis al ni. Estis la Winnetou de hieraŭ vespere. Li turniĝis nur al la „Juna Aglo“. Nin aliajn li ŝajnis tuŝi per neniu vido. Li parolis en sia gepatra lingvo, ne en la angla.

„Venas rajdantoj“, li anoncis.